**N I A V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **NOVEMBRO 1999**

MEL eldonis la 5-an eldonon de “Adresaro de Esperantaj Grupoj”. Oni sendas po 70 ESP (poŝtmarkoj)

**HISPANIO**

Galofré, prezidanto de Kultura Asocio Esperantista, konfirmas ke okazos kurso de Esperanto en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono, Fakultato pri Ekonomia, ekde la 19a Oktobro dum tri monatoj (30 horoj). La kurso valoros tri kreditojn al la lernantoj.
En la "10-a Kongreso de Valencia Esperanto-federacio kaj Murcio" estis nomumita nova Prezidanto de Valencia Esperanto-federacio Augusto Casquero de la Cruz.
José F. Martín lanĉis dissendo-liston por debati aŭ simple por komuniki ĉiun ajn novaĵon pri esperanto. <esperanto@onelist.com>. Por aliĝi, simple sendu malplenan mesaĝon al <esperanto-subscribe@onelist.com>. Pliajn informojn vi trovos ĉe:
http://www.ciudadfutura.com/esperanto/listo.
Aperis la hispana traduko de la libro de Rafaela Urueña, kiu estas verkita originale en Esperanto kaj temas pri la historio de la organizoj de la Eŭropa Unio.

**ILEI**

Kataluna Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj varme invitas vin viziti kaj diskonigi sian retan sidejon en la adreso *http://www.xtec.es/~pmarti10/ilei-cat.htm* kie vi trovos informojn pri Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, pri la ekzamenoj de ILEI/UEA, elementan kurson de esperanto en la kataluna, ktp.

**EKSTERLANDE**

En Oktobro okazis en Vatikano Eŭropa Sinodo, en kiu 240 katolikaj episkopoj kaj delegitoj analizas la nuntempan situacion de la eklezio kaj serĉas perspektivojn por la estonto. La ĉefepiskopo György Jakubinyi el Rumanio tie denove atentigis pri Esperanto kiel ebla solvo de la lingva problemo en la katolika eklezio. En intervjuo hungarlingva de la Vatikana Radio, inter aliaj li diris:" La latina lingvo, kiun mi tre ŝatas, en la katolika eklezio mortis. Mi proponis por internacia uzo Esperanton. Ĉar se oni uzus vivantan lingvon (lingvon de iu nacio) tiam ni surprenus la vivkoncepton kaj kulturon de ties nacio, kaj tiu kaŭzus lingvan imperialismon."

**KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ**

**2-a Apud mara Kultura Esperanto-Semajno** Valencio 4-8a de julio 2000.
Por la venontjara IJK en Honkongo estas planate organizi komunan vojaĝon de Eŭropo - plene per trajno! La karavananoj renkontiĝas en Moskvo kaj de tie ekvojaĝas per la Transsiberia Fervojo. Post tritaga vojaĝo okazas restado en la Siberia urbo Tomsk, kie okazas la OrSEJT, Esperantista tendaro. Poste oni pluvojaĝas orienten tra Mongolio, kie eble alia paŭzeto estos realigebla, al Ĉinio kaj Pekino. De Pekino la vojaĝo daŭras suden, fine en la direkton de Honkongo, kie la karavano alvenu la 5-an de aŭgusto, la unuan tagon de la IJK. Informas: Holger.Boos@gmx.de

**ZAMENHOFA TAGO**

MELorganiza la comida anual en recuerdo del creador de la lengua esperanto

18 de diciembre, sábado a las 14,00 horas

Hotel Puerta de Toledo.

Precio 3.000 pesetas

Reservas por teléfono (contestador) 91 446 80 79, hasta el jueves 9 de diciembre



Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo: http://www.ciudadfutura.com/esperanto

**ESPERANTO EN AMAS-MEDIOJ**

La organo de la sindikato CNT (nº 250) raportis en esperanto pri la Kongreso de SAT kiu okazis en Karlovy Vary (Ĉekio).

TeleMadrid en la programo “Madrid Directo” faris raporton pri la librovendejo “Don Libro” kie vendas nur libroj pri lingvoj, inter ili esperanto. La ĵurnalisto montris la vortareton Sopena hispana-esperanto.

Lucrecia San Antonio estis intervjuita, dum 10 minutojn, en la loka radio-COPE de la vilaĝo Pinto, apud Madrido. Ŝi parolis pri esperanto kaj elstaraj esperantistoj de Hispanio.

En Onda Madrid, programo "Madrid Exprés", Marcos Cruz estis intervjuita telefone, en septembro. Kaj en la programo "Todo Madrid", Mª Celada, ĵurnalistino, en la HEf-oficejon intervjuis al Marco kaj Jezabel Trevisán, kaj al Marcos Cruz.

Esperanto denove tiris la atenton de hispana amaskomunikilo, kaj, plian fojon, tio okazis danke al la ttt-paĝoj de Hispana Esperanto-Federacio. Ĉi okaze la informo, kune kun eta foto, en la semajna gazeto "mh" (Mujer de Hoy), 28a n-ro. Ĉi revuo, suplemento de la sabataj ĵurnaloj eldonitaj de "Grupo Correo" kaj de aliaj en la tuta lando, precipe celas virinojn.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

15 de Novembro je la 19,00 “Fajro kaj glacio” Lumbildoj pri Islando kaj Groenlando. Lupe Sanz

**59-a HISPANA KONGRESO-Majo 2000**

La venonta hispana kongreso disvolviĝas laŭx antaŭviditaj planoj, kvankam la urĝo superregas ĉion. Ĝi okazos de la 29a de aprilo ĝis la 1a de majo de 2000 sub la kromnomo "Kultura Festivalo en Esperanto, Festivanto 2000" per kiu la organizantoj celas allogi eksteran junan publikon. Tiu celo estas ĉefa kaj al tiu estos oferata ĉia alia konsidero. La Organiza Skipo (OS) planas eĉ oferti tradukon de kelkaj aparte interesaj prelegoj al la interesotaj hispanlingvanoj, tiel rompante tabuon pri tradukado kiu de antaŭlonge zumas inter la esperantistoj.

La kongresurbo ne estas ankoraŭ fiksita ĉar, kvankam ĉia strebo plede al la prestiĝa urbo San Lorenzo de El Escorial, estas multaj problemoj trovi taŭgan kongresejon, sufiĉe malmultekostan kaj kun adekvataj ĉambroj, meblaro, ekipoj ktp. Surogate, se la lastaj klopodoj pri El Escorial malsukcesus, la OS celas Kulturdomojn en Madrido kaj en la apuda urbo San Sebastián de los Reyes, kies urbestro, Msx. S-ro Ángel Requena, scipovetas esperanton kaj espereble pli faciligos nian kongreson. Pri la programo, atendu venontajn informojn.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::
::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

Komuniko de Gian Carlo Fighiera al la esperantistoj

"LF-KOOP NE POSEDAS LA GAZETON "HEROLDO DE ESPERANTO"

1.LA ASERTO KE LF-KOOP POSEDAS LA GAZETON "HEROLDO DE ESPERANTO" STAS FALSA". Al neniu LF-k povas montri unu solan -ni ripetas, unu solan-
dokumenton pruvante la asertitan posedon. Al neniu. La sola ekzistanta okumento pri la transdono de la gazeto estas nia propra unuflanka rotokolo de la 17-a de julio 1996 -subskribita ankaù de la redaktorino Ada Fighiera-Sikorska jam grave malsana (ŝi forpasis la 7-an de la posta aùgusto)-, laù kiu protokolo la gazeto kune kun milvoluma biblioteko kaj
aliaj servoj estis transdonita senpage NE al LF-k, sed al Itala Interlingvistika Centro (Milano). En la protokolo, LF-k estis menciita nur kiel helpanto, ne kiel ricevanto aù posedanto de la gazeto.

2. Kiel ĉiuj povas konstati el la dirita protokolo, tiu ĉi TRIFOJE RIPETAS, ke la transdono okazas sub la nepra kondiĉo, ke la estontaj redaktoroj RESPEKTU LA TRADICION KAJ LA PRINCIPOJN DE LA GAZETO.

3. La legantoj, kiuj sekvis la gazeton en la antaùaj jardekoj scias, ke la ĉefaj principoj, kiujn sekvis Ada, estis:

a) la gazeto havas INFORMAN (ne opinian) karakteron pri la disvastigo de Esperanto, je la servo de la tuta Movado ne de apartaj personoj aù ideologioj

b) la gazeto estas sendependa kaj supertendenca rilate al MOVADAJ KAJ POLITIKAJ IDEOLOGIOJ, kiuj dividas la esperantistojn.

4. La nuna redakcio (Silfer en ĝia nomo) promesis respekti la diritajn tradicion kaj principojn (vidu nian artikolon en n° 16/1996), sed, ek de kiam la nunaj redaktoroj (formala redaktorino Perla Martinelli Ari: efektiva redaktoro la edzo Valerio Ari/Silfer) komencis sian agadon, la supra kondiĉo estis entute piedtretita kaj la gazeto estis utiligata por
iliaj personaj celoj.

- La revuo "Literatura Foiro" tuj anoncis sub subskribo de Judith Felszeghy, ke "Heroldo" fariĝis organo de "raùmismo" (doktrino kunverkita de Valerio Ari/Silfer, kiu opozicias al la ĝenerala "vertikala" Esperanto-Movado, negative juĝas la Universalajn Kongresojn -vidu KAJ la tiutemajn asertojn de Perla Martinelli, kiu pro principo ne vizitas UK jam
16 jarojn, KAJ la publikan respondon de UEA-: raùmismo proponas alternativan "horizontalan" Esperanto-organizaĵon).

- Malgraù sia kontraùa skriba promeso, la novaj redaktoroj senrajte ŝnĝgis la kolofonon: en la subtitolo de "Heroldo" la jardeka vorto "Esperanto-Movado" ("vertikala") estis forigita kaj anstataùita de la tutnova "Esperanto-mondo" ("horizontala"), fidele al la doktrino de
raùmismo.

- La nombro de informoj pri la movado falis je 80%; la informoj estis anstataùitaj en ĉiu numero de multnombraj tendencaj, kelkfoje ruzaj, artikoloj subfose al nia organizita Movado, sub diversaj subskriboj de la geredaktoroj (la redakcio, Perla Martinelli PM, la redaktorino, Valerio Ari, Giorgio Silfer, Nicolas Vanof kaj aliaj elpensitaj nomoj de neekzistantaj personoj aù nomoj pruntitaj de komplezuloj; kelkfoje la notoj verkitaj de Silfer estas subskribitaj de surpaperaj asocioj de li kreitaj, kiel E-Pen-Klubon, Interlingvistika Centro, Civito, ktp). Plej naùza estis la moka artikolo pri supozitaj samseksemuloj en la Estraro kaj CO de UEA. La spaco dediĉita al la raporto pri UK sep-oniĝis kompare al antaùe. La Praga rezolucio de UEA estis akre atakita.

- En ĉiu numero, ĉefloke kaj grandspace, la redaktora paro senrajte utiligas la gazeton kiel instrumenton de netolereble granda nombro de akraj polemikoj, atakoj, provokoj, subfosoj kaj insultoj kontraù personaj malamikoj, aliaj esperantistoj kaj Esperanto-gazetoj.

- Senhonte, la paro misuzis la gazeton por propagandi la kandidatiĝon de Perla Martinelli Ari por la posteno de prezidanto de la Akademio, kaj por propagandi la personon Valerio Ari/Silfer kaj liajn asociojn.

Ĉio tio semas spliton, malpacon kaj malharmonion en nia malforta tendaro. La nuna "Heroldo" estas redaktata ekzakte laù malaj principoj ol tiuj, kiuj inspiris Teo Jung kaj Ada, ambaù Honoraj Membroj de UEA, amataj, pacemaj, lojalaj agantoj de nia Movado, popularaj en ĉiuj E-kongresoj dum entute pli ol 70 jaroj.

5. La supraj nerefuteblaj faktoj kaùzis indignon inter la esperantistoj: ni ricevis kopion de multaj protest-leteroj direktitaj al la redaktoroj kaj neniam de ili publikigitaj; pluraj centoj da abonantoj ne renovigis sian abonon; du Landaj Asocioj (la itala kaj la usona) rezignis plue peri "Heroldo"n. Ari/Silfer/Vanof fariĝis grandparte izolita: kiel kandidato al la estraro de la kulturdomo "Kvinpetalo" li ricevis nur 7 voĉojn el 140 voĉdonandoj. Perla Martinelli Ari ne estis elektita prezidanto de la Akademio per grandega kontraùa plimulto.

6. Pro malrespekto de la transdona kondiĉo, nia Societo per komuniko de la 1-a de oktobro 1998 anoncis la NULIGON DE LA TRANSDONO EK DE LA 31-A DE DECEMBRO 1999. Niaj eldon- kaj vendorajtoj de nacilingvaj lernolibroj iris senpage al la landaj asocioj de la koncernaj lingvoj. Ek de la jaro 2000 la nuna gazeto aperos mallegale kaj pirate.

7. Evidente, Ari/Silfer/Vanof rajtas diskonigi siajn ideologion kaj politikajn konvinkojn, sed tiucele li fondu propran gazeton kaj ne ŝtelu perfide kaj trompe la gazeton "Heroldo". Kaj ne hipokrite utiligu la nomon de Ada, kiel nun li faras.

8. Trifoje ni proponis al la respondeculoj de LF-k renkontiĝon por trovi pacan solvon al la nuna demando kaj trifoje ni eĉ ne ricevis respondon.

9. Pro tio, restas nur jena vojo por haltigi la misuzon de la gazeto: bojkoti la abon-pagojn. Tial, ni alvokas al ĈIUJ RESTANTAJ ABONANTOJ PROVIZORE INTERROMPI SIAN PAGON AL "HEROLDO" POR LA JARO 2 000, ĝis kiam la situacio normaliĝos. Homoj, kiel la nunaj redaktoroj, kiuj malrespektas siajn proprajn promesojn kaj la volon de mortinto ne meritas apogon: ili plue trompos la esperantistojn. Ni ne lasu nin trompi de falsaj profetoj kaj de iliaj stultaj teoriaj bataloj, sed laboru por la disvastigo de la internacia lingvo.

Kiam "Heroldo" liberiĝos de la nuna situacio, nia asocio denove eldonos ĝin en la sama antaùa paca spirito, je la servo de la tuta Movado ne nur de unu ĝia partio.

10. Nia asocio sendos al ĉiu petanto kopion de la protokolo de 1996 pri la transdono de "Heroldo" kaj la koncernan postan korespondadon. Nia adreso: Via Sandre 15, Venaria Reale (Torino, Italio), fakso: +(0)(11)226 30 78.

Torino, oktobro 1999.

G. C. Fighiera,
prezidanto de la tradicia leĝe registrita societo sen profita cel "Heroldo de Esperanto", posedanto de la samnoma gazeto registrita ĉe la tribunalo de Pisa (Italio)

****************************************************************************